



Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Kion ni legas

Gvidos: Milan Kolka

Diskuto. Eldonistoj de libroj en Esperanto plendas, ke nur kelkaj homoj aĉetas librojn. Ĉu tio signifas, ke esperantistoj ne legas? Kion legas vi kaj kion vi povas rekomendi al aliaj samideanoj? Ĉu vi konas Esperanto-sumuon? Ĉu ni aliĝu al tiu ĉi projekto?

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 10-an de majo 2022 je 18.00.

Kie: La renkontiĝo okazos rete per Skype

La ligilon mi sendos al vi marde.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskutilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Ni vidos.

Renkontiĝo estos registrata.



Ni rekomendas

- Trapasu **KER ekzamenon** rete. La retaj ekzamenoj okazos (ĉiam kompleksa, skriba, parola): C1 18a de junio 2022, B2 25a de junio 2022, B1 2a de julio 2022. Pli da informjn kaj aliĝilon trovu ĉe <https://edukado.net/novajhoj?id=871>.
- Ekde septembro Adam Mickiewicz Univiersitato en Poznano planas lanĉi novan tipon de studado. Temas pri du jara ĉeesta **magistra studado**, fako **Interlingvistiko** kadre de Lingvistiko kaj informmanaĝado. La studadoj estos en la angla kaj en Esperanto (ambaŭ lingvoj bezonataj). **Studprogamo estas alkroĉita**. Por pli da informoj bonvolu kontakti prof. Ilona Koutny (ikoutny@amu.edu.pl)
- Vizitu **Arbaristan Panteonon**, belegan lokon tuj apud Brno. Reto de firmaj arbaristaj vojoj taŭgaj por promenoj, biciklado kaj promenoj kun infanĉaretoj, belegaj diversspeciaj arboj apude, monumentoj kaj akvofontoj (bedaŭrinde pro longa seko nur kelkaj kun akvo). Propagandisto te tiu ĉi regiono estas esperantisto Miroslav Hruška. La retejo estas ankaŭ esperantlingva. Se vi ĵus ne estas fermita hejme pro la ĉina malsano, iru eksteren kaj promenu en aŭtuna naturo. Faru ion por via sano. La regiono estas atingebla rekte el Brno per publika transporto.
- La 9-17-an de Julio, 2022 **56-aj tradiciaj Baltiaj Esperanto-Tagoj**, KLAIPĒDA, Litovio
- La 16-an – 18-an de Septembro 2022 **Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio**, Pardubice



Programo en majo

La 17-an **Arbarista Panteono** – Miroslav Hruška. Občanský klub, Hybešova 65a

La 24-an *La programo ankoraŭ ne estas fiksita*. Rete per Skajpo

La 31-an **Historio de Ukrainio** – Oldřich Arnošt Fischer. Občanský klub, Hybešova 65a

Mi petas vin, ke vi proponu programon por resto de majo kaj por junio. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA>).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto